



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 6
1973

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
REDAKTORO: HANS AMUND ROSBACH

3-a periodo
40 a (49a) jaro
DUMONATA

La Sanktaj Reĝoj

En stalo, ĉe trogo, genuas la tri,
sin klinas profunde je vido de Li,
la reĝon de l' ter' ili vidas!
Donacojn fordonas kun ĝojo en kor',
sed ili ricevas eĉ pli de l' Sinjor',
kun ili ni ĉion dividas.



Ĉar ni, kiel ili, genuas ĉe l' Reĝ',
kaj Lin ni honoras per kanto kaj preĝ',
ĝojeon en koro ni sentas.
kaj ni donas ĉion al nia Sinjor',
ho ve, estas peko, neniu trezor',
ĉar teraĵ plezuroj nin tentas.

Benitaj la reĝoj foriris de l' stal',
benitaj ni staras post peko kaj fal'.
"Fordonu la ŝarĝojn", li diras.
Li donas pardonon, purigas nin per
la graco kaj pac' proponitaj al ter'
-- al stalo kun ĝojo ni iras!

SCIIGCOJ DE N.E.L.

Kursoj. Estas jam tempo por plani la kursojn por la venonta printempa sezono. Sen kursoj neniuj progreso! Ĉiuj kluboj, kaj precipe la kluboj, kiuj ne aranĝis kursojn dum la nun pasinta aŭtuno, nepre klopodu aranĝi kursojn por komencantoj dum la printempo. Ankaŭ rektaj membroj povas sukcese aranĝi kursojn.

Korespondaj kursoj. Fine aperis la novaj korespondaj kursoj. La prezoj estas por parto I kr.100,00, por parto II kr.100,00, por ano de studado de minimume 5 membroj po kr. 48,00. Varbu kursojn en lokoj, kie ne okazas aliaj kursoj!

Gazeta kurso. Klopodu igi gazeton en via loko aperigi alian gazetan kurson. Ĝi estas havebla ankaŭ por gazetoj oferte prentaj. Petu al N.E.L. pri regularo kaj provleciono.

Prelegoj. Se vi faras prelegon pri Esperanto, bonvolu nepre sendi raporton al N.E.L.; blankedojn por tiaj raportoj al sendas je peto.

Taskotabelo por kluboj. - Decembro: La estraro ripetas la admonon al la membroj pagi sian kotizon por la venonta jaro, kaj la kasisto dirigas la enkuzigon de tiuj kotizoj. La Delegito de U.E.A. dirigas la kolektadon de U.E.A.-kotizoj por la venonta jaro kaj varbado de novaj individuaj membroj de U.E.A.. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj komencas plani la printempan laboron de la klubo. Iuj post la 15a la komisiito de la Eldonejo sendas raporton kaj organ por venditaj libroj al la Eldonejo.

Januaro: La sekretario ellaboras la jarraporton pri la pasinta jaro. La kasisto fermas la kontojn kaj ellaboras kalkulraporton kaj bilancon. La revizoroj kontrolas ke la kasisto faras tion, kaj postulas la kontlibrojn por revizio. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj ĝenerale la printempan agadon, pritraktas la jarraporton, kalkulraporton kaj bilancon, multobligas ilin kaj sendas kun skriba alvoko pri ĝenerala kunveno al ĉiuj klubanoj. Iuj post la ĝenerala kunveno la sekretario sendas raporton pri ĝi (blankedo A9) al N.E.L. kaj al la Distrikto. Antaŭ la 15a la sekretario sendas raporton pri la 4a jarkvarono kaj studraporton pri la 2a jarduono de la pasinta jaro (bl. A 10/B 1) al N.E.L. kaj al la Distrikto. La raportanto sendas raporton pri la klubkunvenoj al Norvega Esperantisto. La kasisto rekte petas la kotizojn de la nepagintaj membroj kaj sendas kotizojn kaj liston al N.E.L. kaj al la Distrikto. La Liga Estraro.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

PROVIZORA REDAKCIO:

Hans Amund Rosbach,
Johan Hammond Rosbach.

ADRESO DE LA REDAKCIO:

Nergt. 37c, 6500 Kristiansund

Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.

ABONPREZO: En Norvegujo kaj eksterlando: n.kr. 12.-

ANONCPREZOJ: $\frac{1}{2}$ paĝo kr 150.-,
 $\frac{1}{4}$ p. kr 75.-, $\frac{1}{8}$ p. kr 40.-,
 $\frac{1}{16}$ p. kr 20.-.

RECENZUJ: Ni recenzas duope ricevatajn librojn, kaj nur mencias unuope ricevatajn.

Kristnasko!
Esle la energio-krizo iomete malgrandigas la uzon de lumo por kreila ĝustan etozon pri kiu ni revas. Sed verŝajne ni ĉiuj, malgraŭ ĉio, havos kristnaskofeston tre similan al tiu, kiun ni havas lastjare, kaj en ĉiuj jaroj antaŭ ĝi. Tio estas: Ni havos kristnaskan arbon, kaj sub ĝi abundas gaje pakitaj donacoj - aŭ eble patĉjo sin transvestigis al koboldo por alporti ilin? Ni havos kukojn kaj aliajn dolĉaĵojn, kaj la grasaĵoj ne mankos. Surtablo ni ankaŭ trovos la drinkaĵojn, kiuj konvenas al la manĝota. Eble ni eĉ kutimas viziti preĝejon en la kristvespero aŭ en unu el la sanktotaĝoj. Tiam tio nepre ne malhelpas al la agrabla sento de kristnasko.

Se ni nur ne pripensas kion la pastro diras - aŭ pli ĝuste kion la anĝeloj, laŭ li, iam diris: Paco sur tero.
Kie estas la paco sur tero? Post 1973 jaroj ankoraŭ ne?
Jen mia - pastra - konsilo al vi:

La kontorfondaĵo.

Pli frue	kr.	890,85
la Urso, Sarpsborg	"	25,00
C. Reiersøl	"	200,00
C.S.B.	"	10,00
H. Danielsen	"	220,00
	kr.	1345,85

Kampanjo Reisæter

Pli frue	kr.	2600,00
T. Reisæter	"	100,00
J. Berggreen	"	100,00
	kr.	2800,00

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

HEROLDO DE ESPERANTO

Heroldo de Esperanto, la sendependa, plej granda kaj plej ofte aperanta Esperanto-gazeto, informas, ke pro la kreskantaj prezoj en Belgujo la abonprezo por 1974 estos kr. 51,00. Sed ĝis la fino de 1973 novaj abonantoj por 1974 estas akceptataj laŭ la ĝisnuna tarifo: kr. 40,00 (dumviva abono: kr. 825,00), kaj ili ricevos la lastajn numerojn de 1973 senpage. Abonojn akceptas:

Esperantoforlaget,
Boks 942, Oslo 1,
poŝtĝiro: 100 31

Bulteno por kolektantoj de Esperanto-insignoj

Multaj esperantistoj interesiĝas pri kolektado de diversaj esperantaĵoj, sed ĝis nun oni preskaŭ neglektis la kolektadon de Esperanto-insignoj. Nun fondiĝis organizaĵo de kolektantoj de kongresaj kaj aliaj Esperanto-insignoj, kiu ankaŭ eldonas malgrandan bultenon. Interesiĝantoj turnu sin al: Vlāda Esala, S.K.N. 37, CS-695 03 HODONÍN, Ĉeĥoslovakujo.

Legu la tuton:

Paco estos sur la tero, inter la homoj, kiuj gloras Dion kaj per sia vivo disvastigas difavoron.

BENITAN KRISTFESTON!

Hans Amund Rosbach.

La tria etapo de nia konkursa serio

Jen la ĝustaj respondoj en la unua etapo (N-ro 3/1973):

1. Piramido de Beops
2. Leonardo da Vinci
3. Richard Nixon
4. Josef Stalin
5. Mainz

Premio al Kirsten Ek, Oslo. Vi aliaj, bonvolu rigardu ankoraŭ unu fojon la bildojn en n-ro 3: Ĉu la tasko estis malfacila?

Jen la ĝustaj respondoj en la dua etapo (N-ro 4):

1. Laos
2. Concorde
3. Mandrake
4. Konferenco Eŭropa pri Poŝto kaj Telekomunikado.
5. David Ostrah
6. Giacomo Puccini
7. Borneo.



en 1889

Premio al Dino Cicco, Romo.

La plej multaj partoprenantoj en nia konkursa serio estas eksterlandanoj - kial?

Vi havas jen bonegan ŝancon por ekonomie susteni vian gazeton kaj por gajni premion.

Kolektu premio-pontojn ĝis la fino de la serio, aŭ pagu 5 kronojn ĉiufoje, por havi ŝancojn ĉiufoje. Aŭ partoprenu ambaŭ partojn de la konkursa. Bonvolu legi la regulojn en n-ro 3.

Jen la novaj demandoj:

1. Fotografio farita en la jaro 1889 pri granda sciencisto, kies nomo estas parto de internacia vorto konata de ĉiu. Kiu estas li?
2. El antikva reliefo ni eltranĉis personon, kiu ludas duoblan fluton. Kiu estas lia nomo?
3. En Hispanujo troviĝas grandioza katedralo, kiu oni finkonstruis en la 1930-jaroj, kaj kiu nomiĝas La Sagrada Familia. En kiu urbo?
4. Kiel nomiĝas la insuloj sur la mapo?
5. La sinjoro en araba vestaĵo estas reĝo. En kiu lando?



2




6

6. Sur la monero staras L.100. El kiu lando estas ĝi?

Respondojn bonvolu sendi - amase! - prefere tuj. Tempolimo estas fino de februaro. Ni treege bonvenigas tiujn respondojn, kiuj samtempe subtenas nian kason. Sed vi ankaŭ povas partopreni sen ia ajn pago.

Se via koverto enhavas nur respondon al la konkursa - t.e. neniu alia kontribuo al



4

00

la gazeto, vi bonvolu fari sur la koverto indikon "Konkursa serio". Tio plifaciligos la ekspedon de la letero.



3

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Recenzo

Lina Gabrielli: Kartavalo. Eld.: Karol Kleszczynski, International Center of Arts, Romo 1973. 80 p., broŝ.

Jen plaĉa libreto kun plaĉa

Jen plaĉa libreto kun plaĉaj skizoj, facile legeblaj, en plaĉa lingva veste. La aŭtoro sendube estas kreskanta arbo en la arbaro de niaj originale verkantaj aŭtoroj, kaj rapide evolus ĝis maturaĝo. La skizoj estas sen ĝena balasto, la esprimmaniero estas flegita, la pensoj ordigitaj. La enhavo ne estas tre streĉa, sed oni legas la pecojn kun ĉiam pli da intereso kaj plezuro.

Ofte strangeta uzo de komo iomete ĝenas, same kelkaj eviteblaj preseraroj (Hove, ni mem konas ilin!) - kaj por mi punkto aŭ komo post la fina citsigno ŝajnas stranga. Permesu al mi ankaŭ korekti ĵenan frazon: "La floroj de la kamparo ne estas pli malbelaj ol tiuj de la ĝardeno" devus esti "La floroj de la kamparo ne estas malpli belaj..." ĉu ne?

Korespondu!

14-jara hungara knabino ŝatus korespondi kun 14-15-jara junulo. Ŝi kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn. Min ĉiu tero interesas. Katalin Horváth, Kálvária u. 7/B 11, H-9024 GYŐR, Hungarujo.

23-jara studento, inĝenier-helpanto, deziras korespondi. Min interesas kompara ekonomio kaj politiko, kaj mi ŝatus lerni pli pri kutimoj, politiko kaj ekonomio de via lando, pri kiu mi scias tre malmulte. Edward Williger, 996 Amarillo Avenue, PALO ALTO, California 94303, Usono.

39-jara edzo, fakulo pri eksterlanda komerco kaj kunlaboro, deziras korespondi. Intereso: muziko, literaturo, fremdaj lingvoj, ĥorkantado. Libor Matějka, Pekařská 68, CS-602 00 BŘNO, Ĉeĥoslovakujo.

18-jara hungara studento de agrikulturo deziras korespondi kaj ligi firman amikecon. Johano Mezeš, Glázer S. u. 14, H-8300 TÁPOLCA, Hungarujo.



5

Carl Stöp-Bowitz fakte vivis ian duoblan vivon, el kiu unu estas la scienca, faka, la alia lia esperantista. Komprenoble la du iom glitas unu en la alian, kaj ankaŭ ne estas facile juĝi, kiu el la du estas la ĉefa.

Kiel sciencisto li komenciĝis la karieron kiam li en 1939 fariĝis licenciato pri naturscienco, kun zoologio kiel specialaĵo. Li iĝis kuretoro de la Universitata Zoologia Muzeo en Oslo, kie li nun - post kelkaj jaroj kiel ginnazia lektoro - estas profesoro pri zoologio. Li doktoriĝis en 1970 per disertacio pri la norvegaj lumbrikedoj.

Lia scienca intereso ĉefe ampleksis la apelidojn, kaj li kontribuis al la esplorado de polifetoj kaj estis pioniro pri la esplorado de lumbrikedoj. Liaj esploroj forte subtenas la teorion pri senlaciacaj rifuĝejoj laŭ la norvegaj bordoj dum la glaciepokoj kvaternaj. . . . Krom sia disertacio li eldonis plurajn esplorojn kaj artikolojn en la franca aŭ angla, ĉiam kun resumo en Esperanto, aŭ en Esperanto kun resumo en la angla aŭ franca. Li estis ĉefredaktoro de la granda verko "Jordens dyreliv" I-III, 1965.

Lia esperanta vivo ne estas malpli amplekse aŭ kolorriĉa. Li konatiĝis kun nia lingvo jam en 1928 kaj lernis ĝin per la dusemajna kurso de Andreo Ĉe en 1930. Kaj post aniĝo ĉe Klubo Esperantista en Oslo la kario estis rapida: Klubasekretario 1931-36, vicprezidanto 1939-1940, prezidanto 1940-47 kaj sekretario 1947-63. En NEL li fariĝis sekr. 1933-37 kaj 1939-1947, kaj post tio li estas prezidanto de la Ligo. Li ankaŭ estis prezidanto de ISAE 1946-49 kaj post tio vicprezidanto. Dum la jaroj 1939-45 li estis sekretario de Ekzameno Komitato, kie li poste prezidas. Kaj ek de 1949 li estas membro de Akademio de Esperanto.



Carl Stöp-Bowitz

8 XII 1913 - 1973



Kune kun Isbrucker li verkis la libron "La Esperanto-movado, ĝia historio, organizo kaj nuna stato" (1948) kaj kune kun Vilho Setälä kaj Otto Vilborg la grammatikan studon "Esperanto - moderna lingvo" (1965). Krome li estis kunlaboranto en pluraj vortaroj kaj ĉefkunlaboranto pri zoologio de "Plena Ilustrita Vortaro".

En 1965 li fariĝis Komandoro I de "Pro Meritoj", la ordeno de NEL, kaj estas Majstro de la ordeno post 1956. Komprenoble li estas Majstro de la kluba ordeno.

Norvega Kroniko

Sauda

La prezidantino Elna Matland malfermis kaj gvidis la kunvenon. La sekretario laŭtlegis la lastan cirkuleron de NEL, kaj el la enhavo ni i.a. eksciis pri plialtigo de membrokategorioj. Poste ni kantis "Aŭtunan Kanton" (Vingede Skarer) de Welhaven. Johan Matland bone tradukis ĝin. Dum la Esperanta Duonhoro la prezidantino demandis la geklubanojn pri kie ili ferias, kaj kiel ili fartis ktp. La anoj devis respondi esperantlingve. Ŝi konstatis, ke la geklubanoj ŝatas vojaĝi longan distancon por de Saŭda en la ferio tiam ĉi jaron. Jen kelkaj ferioj lokoj: Norda kaj Suda Norvegio, Svisujo, Jugoslavujo, Hungarujo, Italujo, Islando kaj Malerko. Post kufopuŝo N. Birkeli rakontis pri "Feriante en Jugoslavujo". Li rakontis interesa laĵ bone esperantlingve pri siaj (li edziĝo kune) travivaĵoj tie.

sekr.

Kunveno 5/11 ĉe s-ino O. Overskei. "Lingvan Duonhoro" gvidis Norman Birkeli, kaj la tasko estis traduki la vorton "ta" en diversaj esprimoj. La tasko ne estis facila, sed per komunaj fortoj ni solvis ĝin. Post kanto kaj manĝo N.J. Matland rakontis pri ferio en Svisujo kaj montris lumbildojn.

sekr.

Sarpsborg

La Urso regule kunvenas ĉiun duan merkredon. La kunveno ĉiam komenciĝas per instruado, kio estas adaptita laŭ la nivelo de la ĉeestantoj Sed ankaŭ kiam novuloj ĉeestas - kaj la plimulto de la anoj estas novuloj - la instruado enhavas elementojn taĝajn por la pli spertaj. La instruado estas ĉiam akompanata de tabulaj desegnoj kaj progresas paralele kun la desegno: vortoj, gramatikeroj kaj afiksoj tiel aperas laŭbezono. Aldone al

la pure lingva instruado okazas ankaŭ informado pri UEA, Akademio de Esperanto, delegita sistemo, ktp.

En ĉi tiu kunveno estas ia formo de kolekto: oni vendas poŝtmarkojn por la ekonomio de Norvega Esperantisto, oni faras ŝaktabulojn elnotadojn por la sama celo, por la klubo fondaĵo aŭ por fortigo de la kluba keso, kiu certe ricevos fortan baton venontjare, kiam la komunumo, ĉar de la malforta ekonomio de la urbo, forstretos ĉiujn mensaĝojn al kulturaj kluboj ktp. Ĉefprogramoj plej ofte estas prelegatoj. En du kunvenoj Johan Hammond Rosbach rakontis pri sia sonora restado en Aŭstrujo kaj Svisujo, montrante diapositivojn, en sia kunveno Th. Hæberg same rakontis pri sia vojaĝo al Venecio kaj Jugoslavio, inkluzive de la UK en Beogrado.

Oslo


2.10. La prezidantino bonvenigis kaj speciale la gastojn el Danujo kaj Germanujo. Stöp-Bowitz referis cirkuleron de NEL pri la konkursoj en N.E., kaj menciis, ke ili apogis la gazeton ekonomie. Li substrekis la bezonon de nova redaktoro. Li ankaŭ referis cirkuleron pri venontjara UK en Hamburgo kaj pri kotizo al UEA. Kari Kalsås rakontis pri travivaĵoj dum la aŭtobusvojaĝo al UK en Beogrado, kaj montris lumbildojn. Ŝi ricevis viglan aplaudon de la ĉeestantoj. Ĉeestis 36 anoj kaj 5 gastoj.

15.10. Kirsten Ek bonvenigis kaj prezentis la kluban gazeton "La Vagabondo". La enhavo estis tre interesa - i.a. notoj el Feroldo pri diversaj kongresoj. John Berggreen klarigis pri la ekonomia rezulto de la aranĝita ekspozicio, kaj poste, dum 10-minuta lingva instruado, klarigis pri la ĝusta aplikado de pro, por, pri kaj per.

O. Kolbrek.

Västerås

Kiuj volas partopreni veturon per aŭtobuso tra diversaj Eŭropaĵ landoj dum 14 tagoj julio/aŭgusto 74 kun ekveturo de Västerås? Ni vizitos la E. kaf-ejon en Stettino, la E. muzeon en Vieno, la UEA-oficejon en Rotterdam, la kongreson en Hamburgo ktp. Ĉu vi havas sugestojn? Ni devos paroli Esperanton dum la vojaĝo pro internacieco de partoprenantoj. Viaj infanoj estas bonvenaj. La Klubo de Västerås estas tre interesita en preparaj aliĝoj antaŭ decembro 1973. Skribu tuj al S-ro Wim Posthuma, Soldatgatan 40, S-72 345 Västerås.



El ekspozicio en Västerås.

Helsingør

Denove okazis la feriaj kursoj en la altlernejo de Helsingør. (22.-29. de Julio 1973). Proksimume 70 samideanoj partoprenis, kaj oni pasigis instruan kaj agrablan serojnon. La kursanoj devenis el 8 landoj en Norda Eŭropo. Jenaj kursoj okazis antaŭtagmeze: Elementa kurso, Konversacia kurso, perfekta studrondo kaj kurso por Priis-metodaj geginstruistoj. Sed ankaŭ la kunesto kun samideanoj donis bonan parolekzercon. Posttagmeze oni aranĝis diversajn ekskursojn por rigardi vidindaĵojn en kaj ekster Helsingør, ekzemple Kronborg, Fredensborg, Fredriksborg kaj Helsingborg. En la lasta loko oni ankaŭ aranĝis konvenon kun lokaj esperantistoj. Estis travivaĵo konstati kiel bone nia lingvo funkcias se oni sufiĉe konas ĝin. Vespere oni pasigis interesajn horojn per diversaj distraĵoj, ekzemple prelegoj kun lumbildoj aŭ filmoj kaj vespero de amuzado.

Bonsukcesa estis ankaŭ la finfesto kun skeĉoj, kantoj kaj aliaj distroĵoj. Ĉiuj loĝis kaj manĝis en la lernejo, kiu havas belan parkon kun lago kaj naĝbirdoj kaj akvotilioj. Frua en la mateno la plej energiaj kursanoj kuris sur la razenoj en la parko. La gvidantoj havigis ankaŭ belan veteron.

Johs. H. Lund.

Ni Ricevis

"Militirado norden kaj suden" de Fremdlingva Eldonejo, Pekino 1972 Temas pri 170-paĝa "bildrakonto" kiu celas glorigi la militon kaj heroigi soldatojn.


Ĉu vi vidas la erarojn?

De tempo al tempo aperas poŝtmarkoj kun preseraroj. Tiuj markoj ofte farigas malofitaĵoj. Multaj interesiĝas pri tiaj multekostaj poŝtmarkoj, sciante, ke la prezoj ja ĉiam altiĝas.

Pli malofte la desegnisto, pro nescio aŭ pro nepripensio, kreas vere strangan produktojn. Ni montras al la tri poŝtmarkoj, ĉi tie reproduktitajn kaj demandas: Ĉu vi vidas la erarojn? Sendube la desegnisto de la usona pm. memoriganta pri la impona flugvojaĝo de Lindbergh lerte desegnis, sed liaj scioj pri geografio ne estis imponaj. Li evidente ne sciis, ke neniu fjordo iras al Parizo, nek ke New Foundland estas unu insulo.

Sur la poŝtmarko el St. Kitts-Nevis (en Antiloj) de la jaro 1903 ni vidas Columbus, dum li rigardas Amerikon per binoklo. La binoklo ankoraŭ ne ekzistis, kiam, en 1492, Columbus venis al Ameriko.

La semantikon sur la franca poŝtmarko verŝajne ĉiu poŝtmarkokolektanto konas. Sed ĉu vi vidas, ke ŝi semas kontraŭ la venton? Kvankam ofte protestinte, agrikulturaĵ institucioj neniam atingis Sargon.



Fra tid til annen er et uttrykk man her bruk for fra tid til annen. På Esperanto: de tempo al tempo.

Partisipper.

På Esperanto har vi tre ganger så mange partisipper som på norsk. Det er selvsagt ikke nødvendig å bruke dem utenskelig, men fra tid til annen (de tempo al tempo) har man bruk for dem. De kan også brukes mer selvstendig enn på norsk.

Multaj interesiĝas pri tiaj pm, sciante, ke...:

"vitende at" er ikke akkurat god norsk. Vi sier: "fordi de vet". Fordi innleder en årsakssetning, som er en av de syv adverbielle bisetninger. Derfor skal partisippet også ha adverbets endelse e. Sammenlign: Protestinte.

Prøv å sette endelsen e på partisippet memoriganta i tredje avsnitt, og hele perioden får en annen mening: "idet man minnet om..." Når her partisippet har fått endelsen a, er det adjektivisk brukt. Det finnes kun en setning som er adjektivisk, nemlig relativsetningen, som gjerne innledes med "som". Sammenlign: la tri pm. ĉi tie reproduktitajn.. "som er gjengitt.."

Teoretisk kunne man da si: "ni vidas Columbus rigardant Amerikon". Det sier seg selv at disse to akkusativene ved siden av hverandre er ubelagte. Derfor unngår vi partisipp-konstruksjon.

Et partisipp kan også være selvstendig substantiv med endelsen o, og betegner da en person.

Eksempler i teksten: kolektanto, semantino.



Ak III

†

Emil Andreassen mortis.

Atingis nin la malĝoja sciigo, ke Emil Andreassen forpasis 86 jarojn aĝa. Li do raskiĝis samtempe kun la eksto de la Esperantomovado - en 1887. Li estas unu el la pioniroj de nia lando kaj estis esperantisto en tiu tempo, kiam ankoraŭ ne ĉiu norvego lernis la anglan. Mi ekkonis lin en la dudekaj jaroj. En 1935 li fariĝis membro de nia klubo "Ascendo", kie li dum multaj jaroj estis vic-prezidanto kaj bibliotekisto. Li ankaŭ estis redaktore helpanto en nia klubgazeto. Li estis kavaliro de la kluba ordeno "Verda Slosilo". Andreassen estis simpatia kaj bona homo kaj lia memoro longe vivos inter ni.

Henry Fridén.

Deziras korespondi:

17-jara ĉeĥa studento, kiu interesiĝas pri fervojoj, deziras korespondi kun amiko/amikino pri fervojoj.

Adreso: Jaromir Hinčica, Sinačkova 27, 709 00 Ostrava 9, ĈSR.

Studieopplegg

I januar vil det komme et stensliert studieopplegg til elevene **Neĝbulo** i Johan Hamrond Fosbachs bok LA MINDA ELI IJK. Det er selv i flere avsnitt eller "studier", og vil derfor se closer, for- og etterstavelser, preposisjoner, uttrykkssmåler; der vil være et spørsmål til lektoren (med eksempler på svar) og andre problemer og oppgaver, og der vil være en kort stilistisk betraktning. Opplaget vil egne seg såvel til selvstudium som til bruk i studiegrupper, men er ikke brukbart for helt nybegynnere. Prisen vil være ti kroner pr. eksemplar, åtte kroner ved bestilling av fem eller mere på en gang. Forhåndsbestillingen betales. Forhåndsbestilte og forhåndsbetalte eksemplarer vil bli sendt med det samme opplaget er komplett. Skriv til Fosbach, 1700 Larpsborg.



La 30-a Internacia Junulara Konferenco okazos en Münster sub la moto "Junularo kaj edukado. Ĝi do okazos en universitata urbo kun grandaj historiaj tradicioj. En ĝi estas - diras alsendita folio - 28 preĝejoj, multaj administracioj, parkoj kaj nekopieblaj drinkejoj.

Al la programo apartenos seminario pri la rilatoj inter lingvo kaj politiko, same kiel la kutimaj eroj: ballo, akceptoj, kulturajoj, ekskurso kun folkloro - akcento kaj laborokunsido de TEJO.

Loĝejoj: Modernaj studentaj domoj
Kostoj: Inter 75.- kaj 140.- DM
depende de aĝo, aliĝdatokaj TEJO
membreci. La kotizo inkluzivas
ĉion.

Informoj: 30-a IJK, p/a Gisela
Jungkamp, D-44 Münster, Mondstr.
3, Fed. resp. Germanujo.

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO - NEFA

Kaldbakktubben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek.



La 17a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio - G.E.F.A.

okazis de la 5a ĝis 10a de oktobro 1973 en Koblenz, la bela urbo situante tie, kie Moselo enfluas en la riveregon Rejno.

Partoprenis ankaŭ 30 eksterlandaj gekolegoj, inter ili 2 norvegoj. La jarkunveno okazis en la grandioza Rejn-Mosel-Halo.

Aldone al la jarkunveno okazis tre interesa programo. Vendrede estis familia kunestado en bela restoracio. Sabate unue rondirado tra la malnova parto de la urbo kun gvidanto, kaj tre interese estis rigardi ĉi tiun urbparton kun 2000-jara historio, kaj kun tiom multe da memoraĵoj el pasintaj epokoj: monumentoj, domoj, preĝejoj ktp.

Poste okazis ŝipekskurso sur la Rejno. Sidante sur la ferdeko kaj ĝuante la belan, preskaŭ someran, veteron, ni kun intereso rigardis la malnovajn kastelojn ambaŭflanke de la rivero. La celo de la ekskurso estis Braubach, malgranda vilaĝo, kaj ni vizitis la proksime situantan kastelon Marksburg.

Dum la festvespero salutis reprezentantoj de la Germana Fervojista kaj de du sindikataj instancoj, la vicprezidanto de IFEF kaj la delegitoj de 7 alilandaj IFEF-sekcioj. Flanke de NEFA salutis

★★★★★

El "Homo kaj Kosmo": Staciestro Guberina en Ŝibernik kursgvidanto.

Al esperantistoj, kiuj iam vizitis Primoŝtenon, estas konata fakto, ke la staciestro en Ŝibernik, Velimir Guberina, estas ankaŭ bona kaj fervora esperantisto. En loka horaro de fervojoj li enkondukis ankaŭ Esp.tekston, pri kio ni legis en la Esperantogazetaro. Jen nova sukceso pri kiu ni sciigas en la gazeto "Slobodna Dalmacija" La Esp.societo "Stjepan Ninić" en Ŝibernik aranĝis kurson kiu daŭris 4 monatojn. Ĝin gvidis Velimir Guberina kaj partoprenis 10 personoj, grandparte junuloj, sed finis kun bona sukceso nur 5. En septembro komenciĝis kurso por progresintoj, denove sub lia gvidado. Gratulon al Velimir Gubernina. Aliaj sekvu lian ekzemplon!

Notetoj

La malfacila vorto „po“.

La vorto „po“ en Esperanto estas prepozicio, kaj gi ne respon-
das al nia „pr.“, sed devas stari
ĉiam rekte antaŭ la numeralo. Za-
menhof diras en „Lingvaj Respon-
doj“ pri tio: Oni ne povas diri
„je 80 centimoj po funto“ aŭ „30
mejlojn po horo“, sed oni devas
diri „po 80 centimoj por (ĉiu)
funto“, „po 30 mejloj en horo“.

Ĉi tiu prepozicio estas slava
elemento en Esperanto, fremda por
la okcident-europaj lingvoj, sed
ni devas klopodi por lerni ĝian
gustan uzadon. Trajno ekz. do ne
„marsas 200 kilometroj po ho-
ro“, sed gi „marsas po 200 kilo-
metroj hore (aŭ en horo, dum ho-
ro)“. Ĉar „po“ estas prepozicio,
ankaŭ ordinare ne sekvas akuzati-
vo post gi.

Ak. II.

Letero el Okcidenta Aŭstralio

Nia Esperanto-grupo deziras en-
nkonti esperantistojn el aliaj
landoj. Ni loĝas en Perth, unu el
la plej izolitaj urboj en la mon-
do; malofte ni aŭdas la universa-
lan lingvon el la lipoj de ali-
landanoj.

Nia malgranda grupo estas vigla.
Ni havas kursojn por studentoj,
sociajn kunvenojn kaj piknikojn.
Tamen inter ni estas nur 4 aŭ 5
spertaj parolantoj de Esperanto.
Por plibonigi nian uzadon de la

lingvo ni devus aŭskulti al vizi-
tontoj al nia lando.

Ni opinias ke inter la maristoj
kaj aliaj vojaĝantoj, kiuj tra-
pasas nian ŝiphavenon Fremantle,
estas samideanoj, kiujn ni ŝatus
renkonti. Atendas tiujn, kiuj vi-
zitos nian regionon, sincera bon-
venigo.

Se eble, vizitantoj devus skri-
bi al ni antaŭ la alveno. Adreso:
Esperanto League of W.A., P.O. Box
53, NEDLANDS, 6009, West Australia.
Tel.: 87 4081, 64 2339.

Jack Hawks
prezidanto.

Norsk Esperanto = Forbund

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

Postadresse: Boks 942, Oslo. Post-
giro: 100.30.

Kontoradresse: General Birchs-
gate 30, Oslo. Tlf 69 14 39.

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30
- 16.30.

Turisma servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32.

Esperantoforlaget a/s

ELDONEJO ESPERANTO A/S

Postadresse: Boks 942, Oslo. Post-
giro: 100.31.

Kontoradresse: General Birchs-
gate 30, Oslo. Tlf 69 14 39.

ĈEFDELEGITO

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn.
118 a, Oslo 6. Postgiro 133.29

REDAKCIO

Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c,
6500 Kristiansund N. Telefon
77 620

EKSPEDEJO

Boks 942, Oslo 1.

ØKONOMI-TRYKK, Postboks 24, 8001 BODØ